

## **ILEI raportas**

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de 2017-10-15 ĝis 2018-01-15.

### **Vivo de la Ligo - eventoj**

**Ekzamensesioj** por 2018 estas planataj: unu en Burundo okaze de la nacia kongreso en aprilo, unu kadre de Tutamerika Kongreso TAKE en februaro. Pri tiaj eventoj okazas kunlaboro inter ILEI kaj la Internacia Ekzamena Komisiono IEK.

**La nova esplorkonkurso** por gajni la **Premion Mauro La Torre** startis. Jam venas kandidat-proponoj.

La Prezidantino Mireille Grosjean sendis **salutvortojn** al la partoprenantoj de la Transjara Kurskunveno en Kameoka, Japanio.

La 01-an de januaro komenciĝis periodo por fari kaj kolekti **jarraportojn** de la sekciestroj kaj la reprezentantoj. La Estraro tre petas ĉiujn koncernajn personojn sendi sian jarraporton, por ke ĝi havu objektivan kaj buntan bildon pri la ILEI-agado en diversaj landoj kaj teritorioj. Krome, la Estraro lanĉis statistikan analizon pri sia membraro. Ambaŭ alvokoj estas petataj cele al ĝustatempa reeĥo.

## **Kapabligo**

### **EIT – Esperanto-Instruista Trejnado**

Dum la ILEI-kongreso en Busano estis lanĉita kaj poste evoluigis bona kunlaboro de ILEI kun edukado.net kaj la redaktoro de la paĝaro D-ino Katalin Kovàts. Temas pri EIT – Esperanto-Instruista Trejnado. Pro la diversaj petoj tra la mondo kaj novaj ebloj instrui Esperanton kiel en Francio estis ellaboritaj kaj lanĉitaj tri novaj programoj por trejnado de Eo-instruistoj. Konkrete du tiaj programoj startis.

Pri la unua nova programo estis vaste disvastigita la alvoko meze de oktobro tra diversaj komunik-kanaloj. Tiu programo estas intensa unujara trejnado kun la kulmino dum la ILEI-kongreso en Madrido julie 2018. Temas pri distanca reta preparkurso pri metodiko kaj gramatiko kaj fizika seminario kun ĉeestaj atelieroj kaj ekzamenoj dum la ILEI-kongreso en Madrido. Al tiu programo jam aliĝis kaj laboras 8 personoj.

Plie: danke al la reagoj post tiu la unua informo en nia facebook-grupo “ILEI labortable” naskiĝis la ideo okazigi alian EIT en Afriko. La iniciatinto kaj ĉefa organizantino flanke de ILEI-Estraro estos la Prezidantino Mireille Grosjean kaj flanke de afrika esperantistaro – la prezidanto de "Scio Sen Bariloj" Privas Tchikpe. La projekto same realiĝos kunlabore kun edukado.net kaj ĝia mastrino Katalin Kovàts. Tiu kurso jam komenciĝis. Aliĝis 10 personoj el 5 diversaj afrikaj landoj. La gestudentoj devas studi per la Reta Instruista Trejnado de Eo RITE dum unu jaro. La kulmino okazos en Kotonuo dum semajno kun seminario, ekzamenoj kaj provlecionoj en novembro 2018.

Laŭ la ebloj de tiuj du programoj eblos akcepti po 24/20 kandidatojn, entute 44 personojn. Por afrikanoj financa subteno dezirindas el la tuta movado tra la organizanta NRO "Scio Sen Bariloj". UEA-konto de SSB: assb-k.

## Kongresoj

### La 51-a ILEI-kongreso en Madrido, Hispanio.

**La emblemkonkurso.** Fine de oktobro la estrarano pri kongresoj Radojica Petrović finpreparis la regularon kaj kunlabore kun Sebastian CYPRYCH, la ILEI-komisiito pri membroprizorgado, vaste diskonigis la alvokon pri la emblemkonkurso por la ILEI-kongreso en 2018. La alvoko iris ne nur al la esperantistaro, sed ankaŭ al neesperantista publiko por prezenti kaj reklami tiumaniere la internacian lingvon. Tiucele estis unuafoje uzita la servilo *Sendinblue*. Sebastian adaptis la tekston, adresaron kaj sendprocedon laŭ la postuloj kaj limigoj de la senpaga *Sendinblue*. Tio donis al ILEI novajn eblojn por aliaj sekvontaj amasaj dissendoj sen risko esti konsiderataj kiel spamanto. Kaj finfine tio malfermis novajn vojojn de disvastigado de Esperanto, almenaŭ konsciigo pri ĝi.

Entute fine de decembro venis **51 pentraĵoj** de 31 esperantistoj kaj neesperantistoj. Dum sia skajpa estrarkunsido la 16-an de decembro la Estraro decidis serĉi kaj inviti fakulojn pri grafiko / dezajno / desegnado por starigi **profesian ĵurion** por la emblemkonkurso, kompetentan por taksi originalecon de la konkursaĵoj, plenumitecon de la konkursaj postuloj, majstrecon, artan valoron k.s. Danke al tiuj klopodoj la Estraro esperas kolekti profesiajn pentristojn, grafikistojn el kelkaj landoj kaj mondopartoj por garantii la valoran interkulturan taksadon.

Dum la tuta aŭtuno kaj duono de vintro okazis traktadoj inter la Estraro, LKK kaj estraroj de du madridaj universitatoj pri **kongresejo**. Aperis kelkaj problemoj, kiuj postulis serĉadon de novaj solvoj. Tiuj ŝanĝoj estis anoncigitaj en IPR 2017/4. Estis tial iom prokrastigita kunmeto de la kongresa buĝeto kaj kotiztabelo.

Fine de oktobro okazis kunsido de LKK kun direktoroj de la nova kongresejo. Temis pri prezoj kaj lu-kondiĉoj por la ILEI-kongreso. Krome, estis diskutitaj la ebloj kaj loko por la kongresa simpozio. LKK speciale zorgas pli aligo de neesperantista ekstera publiko. **Du kongresoj samloke:** La Hispana Esperanto Federacio HEF, Landa Asocio, havos sian kongreson samloke kaj parte samtempe kiel ILEI.

Novembre venis de UEA propono okazigi **komunan simpozion UEA-ILEI** en Madrido. Meze de novembro estis decidita, ke la organizado de la simpozio estos precipe en manoj de ILEI, kaj UEA enplektiĝos en la ellaboritan de ILEI kaj LKK programon.

Decembre estis komencata preparo de la **detala programo por la kongreso**. En la programskemo, kompilita de la estrarano pri kongresoj Radojica Petrović, la Estraro dividis diversajn programerojn inter la estraranoj, kiuj planas partopreni la kongreson. Pri kelkaj programeroj okazis kaj okazas ĝis nun ardaĵ debatoj, koncerne al diversaj interkulturaj momentoj kaj aspektoj.

Por la numero de IPR-2018/1 estis preparita pere de la estrarano pri kongresoj Radojica Petrović 4-paĝa materialo prikongresa, kiu entenas paperan aliĝilon, kotiztabelojn kaj aliajn tiurilatajn informojn.

La aktuala kongresa materialo ankaŭ regule aperas ĉe [www.ilei.info](http://www.ilei.info), ĉe <https://eo.wikipedia.org/wiki/ILEI-Kongreso>, ĉe la grupo “ILEI labortable” en Facebook kaj en la paĝaro de Hispana Esperanto Federacio [www.esperanto.es](http://www.esperanto.es).

Meze de decembro la Unua Komuniko kaj aliĝilo estis finredaktitaj pere de la estrarano pri kongresoj Radojica Petrović kaj disvastigita tra diversaj kanaloj de ILEI kaj LKK.

Decembre-januale estis finkompilitaj la kongresaj paĝoj kun ĉiu aktuala informo – ĉe ilei.info pere de la prizorganto de la retejo de ILEI Jozefo Nemeth kaj ĉe Hispana Esperanto Federacio HEF pere de LKK.

Ankaŭ estas preparata materialo pri la kongreso por *Revuo Esperanto*.

### **Venontaj kongresoj**

Oktobre la Estraro pridiskutis regulojn de la **konkurso** por elekto de invitantoj de kongresoj de ILEI en la jaroj 2019 kaj 2020, modifitajn de Radojica Petrović laŭ la spertoj de antaŭaj konkursoj kaj la unua kongreso-2017 en Suda Koreio. Fine de oktobro la konkursa informo estis vaste disvastigita. Decembre la materialo estis finreviziita. La retejo-prizorganto Jozefo Nemeth publikigis ĝin ĉe la paĝaro ilei.info.

### **Komisionoj, sekcioj, reprezentantoj kaj kontaktpersonoj**

Fine de oktobro la Prezidanto Mireille Grosjean finpreparis kolektojn de jaraj raportoj de sekciaj agadoj por 2015-2016. La prizorganto de la Liga retejo Jozefo Nemeth publikigis ilin en la paĝaro ilei.info. Do, danke al tiu senĉesa kaj nefacila laboro ILEI havas sekciajn raportojn de 2008 ĝis 2016. Krome, la Prezidantino kaj viscekreteriino iom modifis la modelon por la jarraporto kaj kreis novan ŝablonon por membrolisto de sekcio. Por 2017 la tasko kolekti kaj prepari jarraportojn de sekcioj transiris al la vicsekreteriino Elena Nadikova. Do, la Estraro konvinke petas ĉiujn sekciestrojn kaj reprezentantojn de ILEI raporti pri agado enkadre de la Ligo por havi aktualan kaj ĝustan informon kaj fari analizon pri Esperanto-instruado en la mondo kaj ĝia evoluo. La Estraro elkore dankas tiujn sekciestrojn kaj reprezentantojn, kies raportoj venis jam decembre.

**Ĉinio.** Omaĝe al Zamenhof-jaro, aŭspiciate de la ĉina sekcio de ILEI, Pekina E-asocio kaj ĈRI (Ĉina Radio Internacia), en Ĉinio furoris voĉlegado en Esperanto ne nur inter plenkreskaj esperantistoj, sed ankaŭ inter infanoj de elementaj lernejoj. La 20-an de oktobro en la urbo Zhengjiang, Jiangsu-Provinco, okazis E-aranĝo pri libro-legado en la elementa lernejo BAOTALU. La agado ricevis grandan subtenon kaj helpon de la lernejo kaj la urba Eduka Buroo. Flanke de ILEI partoprenis la vicprezidanto Xiao-feng GONG “Arko”.

### **Internacia Pedagogia Revuo (IPR)**

La Estraro kaj la ĉefredaktoro de IPR Jozefo Nemeth ĝis nun solvas la problemon pri nericevo de IPR 2017/1 por sendi ĝin al ĉiuj nericevintoj.

Decembre iniciate de la Prezidantino Mireille Grosjean okazis interkonsento inter la Estraro kaj du ĉefredaktoroj Jozefo Nemeth kaj Stano Marček pri la jara tempoplano por IPR kaj JA – cele al plenumado de la decido pri samtempa kaj “samkoverta” livero de la ambaŭ revuoj al iliaj abonantoj.

### **Juna Amiko (JA)**

Fine de oktobro ene de la Estraro definitive determiniĝis la nomo por la nova servo de ILEI, nome nova membreco, kiu inkluzivos rabaton por Juna Amiko. Temas pri “supera membreco”, kiu inkluzivos membrecon en la Ligo, abonon de la paperaj IPR kaj JA kontraŭ pli malalta kaj favora prezo. La informo pri tiu nova servo estis vaste diskonigita tra diversaj kanaloj en novembro.

Komence de januaro venis propono el Hungario de unu el konstantaj rubrikestroj de JA: cele al rekompenco permesi al la konstantaj kunlaborantoj senpagan membrecon en ILEI. La diskuto survojas.

### **ILEI en la Reto**

Kiel jam kutime, la Prezidantino Mireille Grosjean, la estrarano pri kongresoj Radojica Petrović regule aldonas freŝajn informojn kaj novaĵojn al la grupo en Facebook “ILEI labortable”, “Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj”, “ILEI-kongresoj”.

### **Kunlaboro kun UEA**

Meze de oktobro en la suda parto de Barato (Hinda Unio), en la urbo Bengaluro okazis la 4-a Sud-Azia Seminario (SAS 4). Tie estis oficiale prezentitaj UEA (pere de ĝia vicprezidanto Stefan MacGill) kaj ILEI (pere de la Prezidantino Mireille Grosjean). La seminario pasis sukcese, kaj estis decidita, ke UEA kaj ILEI kunlaborados, por ke la 5-a SAS estu ne nur bela evento, sed la komencpunkto de longe atendata reviviĝo de E-movado en la sub-kontinento. La 21-23-an de oktobro la vicprezidantino de ILEI Xiao-feng GONG “Arko” partoprenis la Strategian Forumon de UEA pri Orientazia Movado de Esperanto en la urbo Hangzhou, Ĉinio. Tio estis jam la dua sesio (la unua okazis en la jaro 2015). Ŝi raportis pri E-instruado en Orienta Azio.

Oktobre la Prezidantino sendis oficialan reagon al la diskuto rilate al la parollingvoj de volontuloj en Centra Oficejo de UEA.

UEA kaj ILEI komencis pripensadon de la komuna simpozio ILEI UEA dum la ILEI-kongreso en Madrido. La ĉefa organizado estos en la manoj de ILEI.

Bona atingo estas, ke danke al la iniciato kaj persisto de nia Prezidantino realiĝas bona kunlaboro de ILEI kaj la redaktoroj de la *Revuo Esperanto*, kiel koncerne la agadon de ILEI tiel koncerne la rubrikon AFRIKO BRILAS.

### **Kontaktoj kun aliaj enmovadaj institucioj**

Dum la **4-a Sud-Azia Seminario en Bengaluro** meze de oktobro okazis fruktodona komuna kunsido kun reprezentantoj de diversaj organizoj: UEA, ILEI, Nepala Eo Asocio NESPA. La Prezidantino Mireille Grosjean skizis siajn kontaktojn kun *Internacia Asocio de Edukistoj al la Paco* (IAEP – *International Association of Educators for Peace*) kaj kun *Lernejo Ilo al la Paco* (EIP – *School Instrument of Peace*) kaj lanĉis la ideon de malferma kongreso komuna kun la nepalaj Landa Asocio, ILEI-sekcio kaj tiuj du institucioj. La ideo estis diskutita kaj akceptita pere de ĉiuj kunsidantoj. Estis decidite, ke ĉiu concerna landa asocio unue interne diskutos pri tiu propono. Poste estos akceptita la decido pri la kongreso. Jam novembre venis akcepto de NESPA. Do, la projekto survojas. Ĝi okazos sept.okt. 2019 en Katmanduo, tiu malferma kongreso ebligos kontakton kun reprezentantoj de NROj de la nepala ĉefurbo; la temo rilatos al edukado al la paco.

Decembre la paĝaro edukado.net publikigis anoncon pri la projekto de ILEI “**Komuna Legado okaze de la Tago de la Libro**”. Por la 15-a de dec. 2017 la elektita teksto estas *Esperanto kaj demokratio*, verkita de japana pacifistino, Verda Majo.

*Heroldo de Esperanto* kaj ĝia redaktoro Fabrício Valle lanĉis novan iniciaton kaj invitis ILEI-n esti kuniniciatinto pri unu numero de la kolekto 2018. La propono estis akceptita. Temas pri la diskuto pri la minacoj por Esperanto “La E-movado krizas”. Ĉe la suba ligilo eblas informiĝi pri tiu iniciato. <https://docs.google.com/document/d/1RVVt5qoKU6KdmTQmGgj2RoVICERPjchkSAvCugADEEU/edit?usp=sharing>

La Prezidantino Mireille Grosjean nun preparas artikolon pri la temo.

### **Kontaktoj kun ekstermovadaj institucioj**

Novembre-decembre ene de la Estraro estis diskutita kaj voĉdonita la definitiva versio de la kontrakto inter UEA – ILEI kaj la universitato de Zaozhuang, Ĉinio, kie ekzistas Eo-muzeo. Temas pri kunlaboro inter 3 institucioj en Eo-medio. Tamen novaĵoj el Ĉinio januare daŭrigis la diskuton.

Okaze de AMO-seminario en Parizo la 10-an de decembro 2017 kunsidis reprezentantoj de UEA, ILEI kaj TEJO; ili sukcesis skizi **agadplanon** por efike aperi ĉe **UNESKO**. Danke al sia laboro nome de UEA en Ĝenevo (2009-2011) la prezidantino de ILEI povis multe kontribui al tiu planado, kune kun la reprezentantoj de la aliaj institucioj kaj la observantoj de ILEI ĉe UNESKO. Detala raporto aperas en la *Revuo Esperanto*.

### **Dankoj**

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo ricevu elkorajn dankojn!

Vicsekretario de ILEI:

Elena Nadikova

Prezidanto de ILEI:

Mireille Grosjean

2018-01-15